**Praha-ek-1956-42_43-09**



Oktobro – Novembro 1956 Aperas laŭbezone.

Karaj samideanoj, estimataj amikoj!

Prezidanto de TKKE s-ano Josef Vítek ricevis de la ministrio por lernejaferoj kaj kulturo leteron datitan la 19.9.1956, kiu enhavis jenan ĉeĥlingvan tekston: „Estimata kamarado, ĉar montriĝis, ke pritraktado de la propono por principa solvo de la problemoj de Esperanto-movado en kompetentaj organoj daŭros pli longtempe, ol oni supozic, mi postulas de vi, ke vi aranĝu prokraston de la konferenco de Esperantistoj, kunvokita per la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en urbon Olomouc. Ĝian daton ni interkonsentos post eldono de la principa decido. Mi petas vin, ke vi afable prizorgu, ke ĉiuj invititoj estu informitaj pri la prokrasto de la dato de la konferenco.“ Subskribita estas gvidanto de sekcio por klerigaj institutoj kaj klerigaj lernejoj A. Richtr.

Kvankam la organizaj laboroj kaj preparo de la konferenco jam plene disvolviĝis, obeis TKKE post antaŭa pritraktado la deziron de la ministrio por lernejaferoj kaj kulturo kaj decidiĝis prokrasti la konferencon de la 20. kaj 21. de oktobro 1956 je pli posta dato, kiu estos fiksita en interkonsento kun koncernaj organoj post solvo de principaj problemoj de nia Esperanto – movado.

Ni petas ĉiujn samideanojn, kiuj aliĝis al la konferenco, ke ili akceptu afable la Saigon pri ĉi-ŝanĝo kaj ni certigas ilin, ke TKKE faros ĉion, por ke la tutŝtata konferenco efektiviĝu en la tempo plej proksima kaj ke ĝi alportu la finan solvon de Esp.movado en nia patrujo.

Al tiuj, kiuj tamen kaŭze de prokrasto de la konferenco skribe nuligos siajn aliĝojn, estos resenditaj la antaŭpagoj post dekalkulo de poŝtelspezoj.

Ĝis la 30.9.1956 aliĝis al la konferenco 672 delegitoj el 140 lokoj en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlandaj gastoj el USSR, Ĉinio, Pollando, Hungario, Bulgario, Rumanio, Jugoslavio, Germana dem. respubliko, Aŭstrio, Vietnamio, Danlando, Nederlando kaj Svedio.

Olomouc – LKK: Jaroslav Karhan, Dro Vladimír Mohapl

TKKE: Josef Vítek – prez., Miloš Rudolf – sekr.

\- - - - - -

REGIONA KONFERENCO LA 23-AN DE SEPTEMBRO EN OSTRAVA, discipline kaj laborrezulta modela kunigis pli ol 60 gesamideanojn el la regionoj Ostrava – Olomouc. Prezidis s-anoj Vl. Slaný, Dro Vl. Mohapl kaj Drah. Kočvara. Dum la traktado, komisiito de TKKE, sekretario M. Rudolf informis la konferencon pri prokrastigo de la Tutŝtata konferenco en Olomouc pro supre menciitaj motivoj. Post la pritakso de la ĝisnuna laboro de TKKE la reprezentantoj de Pacdefendantoj, de la Junulara kaj ĉiuj ceteraj partoprenantoj unuanime aprobis la laboron kaj ĝisnunan linion indikace sian plenan volon firme subteni TKKE en ĝia streĉo por oficialit la movadon en nia respubliko. Pluraj samideanoj (Dro Mohapl, Lička, Kočvara, Odehnal, Slaný, Solnický k.c.) akcentas, ke estu respektataj kaj kandidataj personoj, kiuj post la jaro 1952 en plej malfavoraj tempoj montris sian aktivecon kaj supozas la garantion, ke ili ne serĉas en la movado sian personan gajnon.

Post la solvo de regonaj problemoj s-anino Bartovská anoncas venontan laborkonferencon en Místek kaj bonvenigas tien la interesulojn. Kvinhora fruktodona traktado estis manifeste finita per „La Espero“.

\- - -

**Praha-ek-1956-42_43-10**



POR SUBTENI PLUAN ELDONADON DE „TKKE INFORMAS“ SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY SENDIS SIAN DONACON DE KČS 100,-- SINCERAN DANKON!

- - -

ESPERANTISTA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Bratislava:
Pli ol 50 personoj aliĝis al la kurso. Du paralelajn klasojn instruas altlernejanoj Zvara kaj Slivka laŭ Ĉe-metodo.

Brno:
Dum la Ĉeĥoslovaka Maŝinfaka Ekspozicio en Brno devis la Esperantista rondeto ĉe Kleriga Kunularo improvizadi siajn kunvenojn ĉar ĉiuj ejoj en lokaj hoteloj kaj do ankaŭ hotelo Slovan estis je dispono de ekspozicia administrado kaj de komerca ĉambro. Oni provizore kunvenis ĉiumarde en Domo de Kleriga Kunularo, Roosveltova 13. Kursoj bone funkcias sub sperta gvido de s-anoj J. Vondroušek kaj Jiří Kořínek.

Děčín:
Esperantista rondeto ĉe fervoja Kulturklubo bone prosperas. Al la kurso aliĝis 35 adeptoj, gvidas s-ano Václav Růžička.

Doksy:
Post bona tuturba propagando (ankaŭ disaŭdiga) aliĝis al la kurso 32 personoj. Kurson gvidas sperta Václav Špůr.

Dubá:
Ankaŭ en tiu ĉi urbo, 18 personoj estas instruataj al Esperanto de s-ano Špůr, kiu eluzas urban disaŭdigon por periodaj informoj pri nia movado. Vakancan propagandon por Esperanto ankaŭ faris Josef Vítek en sia filmprelego pri Finlando, kiun vizitis 130 personoj.

Frýdek-Místek:
Por Teksistaj tagoj aranĝita mirinde bela ekspozicio „Esperanto proksimigas popolojn de tutmondo“, kiun vizitis preskaŭ 2000 homoj, kiuj montris viglan intereson. Ĉefzorganto s-anino Bartovská.

Hradec Králové:
Tre sukcesa artvespero kun membroj de la Verda Ĉaro de Julio Baghy aranĝita la 15-an de oktobro en granda salono de Uzinklubo d entrepreno Vítězný únor.

Hranice na Moravě:
En niajn vicojn ni fonvenigas nove fonditan rondeton ĉe Uzina Klubo Sigma!

Jihlava:
Esperantista klubo en Jihlava post sukcesa ekspozicio kaj prelego de s-ano Josef Vítek pri Finlando (kiun ĉeestis pli ol 500 personoj) komencis  la 9-an de oktobro kurosn por 44 komencantoj. Laŭ ĉe-metodo instruas s-ano Karel Mucha. La klubo estas subtenata de Kleriga domo. Jihlavanoj estas daŭre informataj pri Esperanto pere de pluraj vitrinaj ŝranketoj. La klubo kunigas 15 anojn, kiuj kunvenadas ĉiuĵaŭde je 18-a ĝis 20-a horo. Originalaj kaj ankaŭ tradukitaj laboruj de lokaj esperantistoj aperis jam prese.
Karlovy Vary:
Nova kurso por komencantoj startis la 4-an de oktobro. Aliĝis 10 personoj. Gvidas s-ano Tichota. Kurso por progresintoj gvidata de loka prezidanto J. Horák. Pluraj eksterlandanoj vizitis la mondfaman banejlokon kaj venis en kontakton kun loka samideanaro.

**Praha-ek-1956-42_43-11**

Nová Paka:
S-ano T. M. Bohun raportas: „Bonŝance, mi fondis tie ĉi Esperanto-Rondon, al kiu mi dediĉas preskaŭ ĉiun mian liberan tempon. Al ĝi aliĝis ĝis nun superatendita nombro de diversaĝaj adeptoj. Ankaŭ unu blindulino aliĝis kaj faras bonan progreson. Ni estas pli ol 25 anoj – ĉiuj komencantoj, el kiuj jam elstaras entuziasmuloj. Mi devas diri, ke mi sentas min feliĉa inter niaj „Rondanoj“ speciale, kiam mi rimarkas progreson kaj ĝojon. Nia agado vekas jam certan admiron ĉe multaj, al nia movado pasivaj enloĝantoj, kiuj pensis pri niaj nuraj momentaj ekflamoj. La opinio ŝanĝiĝas, ke nia entrepreno estimiĝas en multaj okuloj. Mem la instruistaro ne montras plu malamikecon, male, en kelkaj kazoj montras eĉ helpan emon. En niaj kvar esperanto-kestoj oni trovas ĉiam novan kaj freŝan materialon. La ŝildoj sur la klubejdomo kaj urba fervojstacio bone servas. Venas eĉ el pli malproksimaj lokoj diversaj interesplenaj demandleteroj. La prezidantecon transprenis la plej agema rondano Miroslav Nýdrle, Lomená 552, Nová Paka, kiu montras jam ecojn mem gvidi la Rondon. La kurson mi mem daŭre gvidas. Ĉar ankaŭ en alia uzino montriĝas jam intereso por fondi grupon, mi kun plezuro observas la evolut. Plej gravan malhelpon kaŭzas ĉiam kreskanta manko da lernolibroj kaj ni tial sopire atendas la venontjaron.

Písek:
Plene elvendita prelego kun kolorfilmoj de Josef Vítek pri Finlando. Kurson por komencantoj (46 personoj) gvidas loka prezidanto L. Křivánek.

Plzeň:
Loka rondeto stalas pro daŭra akra malfavoro de oficialaj instancoj, kvankam eseprantistoj en Plzeň, precipe la prezidanto s-ano R. Burda klopodas reaktivigi la rondeton en kadro de la Kulturdomo. Ni supozas, ke nia plendo ĉe la ministrio por lernejaj aferoj baldaŭ venigos ŝanĝon de la starpunkto ankaŭ en tiu ĉi okcidentbohemia metropolo.

Poděbrady:
Esperantista rondeto ĉe Distrikta biblioteko aranĝis en septembro kaj oktobro tri prelegojn kun kolorfilmoj pri Skandinavio de s-ano Josef Vítek. A prelegojn vizitis 560 homoj. Dum septembro tutan monaton propjata nova kurso: grandaj afiŝoj, belaj diapozitivoj en loka kino kaj urba disaŭdigo. Antaŭ la kurso klarigis la neceson de Internacia lingvo s-ano inspektoro Nozar. La kurson por 22 adeptoj laŭ ĉe-metodo gvidas s-ano F. Pytloun.

Praha:
Regulaj programaj klubvesperoj vizitataj de 60-70 klubanoj alportas altnivelajn programojn. Bonega kunlaboro kun Osvětová beseda, kiu pagas lupagon por la klubejo (por unu vespero 30 Kčs). Same altnivelaj estas mardaj kunvenoj de la Kluba Junularo. La ciklo pri Skandinavio kun kolorfilmoj de nia membro Josef Vítek estas en Malgranda sceno por la sesa fojo ripetata. Lunde la 22-an de oktobro Hungara-Ĉeĥoslovaka vespero kun partopreno de hungara , bulgara kaj rumana delegitaroj, oficialaj kaj politikaj urbaj laborantoj. Invititaj estas ankaŭ ĵurnalistoj. Aranĝon transpreni la direkcio de Osvětová beseda. En la tuta ĉefurbo anoncis afiŝoj starton de kursoj. La 2-an de oktobro laŭprograme estis malfermitaj: klaso por infanoj (Eva Řiháčková), tri klasoj por komencantoj (Ant. Slanina, Jul. Bendová, Lad. Kynčl), klaso por progrsintoj (Eva Seemannová). Instruistoj estas salajritaj po 16 Kčs por unu lecionhoro de Osvětová beseda. Sekvenda ekzemplo por ceteraj lokoj. Pluraj eksterlandanoj daŭre vizitas la ĉefurbon kaj venas en kontakton kun ni.

Strakonice:

Plensukcesa prelego (6.10.) pri Finlando de Josef Vítek la 9.10. malfermita kurs opor 42 komencantoj. Gvidas s-ano J. Blažek.

**Praha-ek-1956-42_43-12**



Trutnov:
La 16-an de septembro en Distrikta landkleriga muzeo malfermita Esperanto-ekspozicio daŭris plenan monaton kaj altiris grandan atenton de vasta publiko urba kaj regiona. Loka rondeto ĉe Domo de kulturo regule kunvenadas ĉiulunde ja la 20-a horo en propra klubejo en Bulharská strato (kontraŭ la vendejo de sportobjektoj). Lokaj gvidantoj s-anoj Josef Čejka kaj E. Sedláček.

Vejprty:
Kurso por 30 lernantoj okazas en uzdo Tosta. Kursgvidanto s-ano Vacek.

Vsetín:
Komence de septembro ekfunkciis nova rondeto ĉe uzina klubo „Z“. Kunvenoj ĉiuvendrede en bela salono de Z-Teatro. Por nova kurso aliĝis 17 komencantoj. Adreso de la rondeto: Aleš Berka, 1423 Vsetín.

La ĉeĥoslovaka kaj ankaŭ tutmonda esperantistaro interesiĝas pri via laboro! Raportu pri viaj sukcesoj! Nia informilo estas legata en 163 lokoj ĉeĥoslovakaj, en ĉiuj eŭropaj landoj (de nuna numero ankaŭ en Albanio) kaj en multaj transmaraj landoj. Tiu ĉi fakto meritas vian raporton, kiun sendu al la redakcio (Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.).

- - - - - - - - - - -

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA PRESO (laŭ la materialo, kiu nin atingas de niaj legantoj kaj kiu estas precize prilaborita de nia kunlaboranto s-ano Josef Forman, Praha XIII – Madridská 22. Al tiu ĉi adreso daŭre sendu ĉiun priesperantan presmaterialon!
Dum la tempo de februaro 1955 ĝis majo 1956 aperis en 26 diversaj ĉeĥoslovakaj gazetoj entute 61 artikoloj aŭ mencioj pri Esperanto. Nombro de tiuj, kiuj pozitive kaj direkte parolas pri uzo de Esperanto, estas 55 laŭ sekvanta divido:
- pri literaturo, teatro, belarto – 24
- pri alia lbaoro de esperantistoj – 25
- artikoloj ekskluzive pri Esperanto kiel lingvo internacia – 6

Ni povas do konstati: - en ĉeĥoslovaka preso aperas ĉiusemajne meznombre unu artikolo aŭ mencio pri Esperanto – 90% de ĉiuj artikoloj parolas pozitive por Esperanto – 3% kontraŭ Esperanto kaj – 7% simple mencias Esperanton sen ia vidpunkto.

- - -

S. A. T. en Beograd. De 24. ĝis 30.7. okazi sen Beograd la 29-a SAT-KONGRESO. Ĉeestis ĉirkaŭ 600 delegitoj kaj gastoj el 19 landoj. La kongreson ĉeestis observantoj el Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Hungario. La kongreso estis ankaŭ salutita de polaj kaj sovetiaj kamaradoj. Ĉeĥoslovakion reprezentis komitatano de TKKE s-ano Dro Jaromír Jermář. Dum la kongreso oni pritraktis ankaŭ kelkajn problemojn koncerne la SAT-agadon en popol.demokratioj.

- - -

POLAN KONGRESON EN VARSOVIO LA 27.-28. de oktobro oficiale partoprenos la komitatano de TKKE Dro Jaromír Jermář kaj neoficiale pluraj gesamideanoj, inter ili ankaŭ la reprezentanto de la Esp. Klubo en Praha sekretarino Jiřina Holá. Al niaj polaj fratoj ni deziras brilan kongreson, prosperan laboron kaj gajan humoron pro ilia favora situacio!

- - -

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estas la busola Esperantista organizaĵo internacia sin okupanta nur pri la progresigo de Esperanto. – 25 Landaj Asocioj aliĝis al UEA, tiel formante ekzemplon de modela

demokrata organizaĵo. Iliaj membroj rajtas uzi la servojn de UEA. – 11 Fakaj Asocioj Esperantistaj faris kontraktor pri kunlaboro kun UEA, fakte aparte grava por la disvastigo de Esperanto en fakaj medioj.

**Praha-ek-1956-42_43-13**



-UEA atendas ĝeneralan aliĝon de la esperantistoj, ĉar ju pli da membroj, des pli valoraj kaj pli ampleksaj povos esti la Jarlibro kaj la Revuo Esperanto. – Ĉiu esperantisto, kiu alias al UEA, ricevas ĉiujn favoraĵojn de membreco kaj samtempe helpas krei fortan asocion UEA, kies potenco je traktadoj kun oficialaj instancoj, ekz. UNESCO, Eŭropa Konsilantaro ktp. kreskos kun pligrandiĝo de la membronombro. Tial UEA varme invitas vin fariĝi Individua Membro de UEA. La kotizoj por venonta jaro 1957:

| | |
|---|---|
| MJ (membro-jarlibro) | Kčs 25,-- |
| MA (membro-abonanto) | Kčs 50,-- |
| MS (membro-subtenanto) | Kčs 75,-- |
| PATR. (membro-patrono) | Kčs 500,-- |
| DUMVIVA MEMBRO-unufoje por ĉiam | Kčs 1000,-- |

Jam nun estas eble aliĝi por jaro venonta! Malnovaj membroj renovigu vian membrecon antaŭ jarfino. Per tio vi certigos por vi fruan ricevon de Jarlibro kaj seninterrompan ricevadon de plej bela nia revuo. Per frua pago vi ankaŭ grave helpos nin en niaj administraj laboroj, kiuj fine de la jaro estos grandaj. Varbu novajn membrojn! Teritoria oficejo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, ĉefdelegito Jaroslav Šustr, Praha I., Dlouhá 10.

\- - -

GRAVA! DEKJARA DATREVENO DE LA FONDIĜO DE UNESCO! GRAVA!!!

La 4-an de novembro 1946 ekfunkciis UNESCO. Por plia firmigo de la rilatoj inter UEA kaj UNESCO, kiel ankaŭ por la plibonigo de la rilatoj inter la landaj asocioj kaj la naciaj UNESCO-komisionoj, estas necese utiligi tiun okazon por aranĝi specialajn prelegojn aŭ almenaŭ prelegetojn pri UNESCO en ĉiuj Esperantaj societoj, grupoj kaj kluboj. Plej oportune estus fari specialan aranĝon tiucele precize la 4-an de novembro. Se tio ne estas ebla, tiam iun daton, kiel eble plej proksiman al la 4-an de novembro. Se la koncerna grupo pro kiu ajn kaŭzo ne povas organizi specialan vesperon dediĉitan al UNESCO, tiam oni organizu almenaŭ mallongan mencion pri la dekjara datreveno en la kadro de la regula societa kunveno. Por faciligi vian taskon mi estas preta sendi al dezirantoj koncizan skizon por prelego pri UNESCO. Vi povas utiligi tiun skizon laŭ via plaĉo. Tute speciale vi povas ellasi kelkajn partojn aŭ aldoni aliajn. Speciale mi atentigas, ke ĉiu societo, klubo, rondeto, nepre min informi pri sia UNESCO-aranĝo por fari la tutŝtatan statistikon!

Josef Vítek, Jungamnnova 24/I.
Praha II.

\- - -

ĈINA ESPERANTO-LIGO (P. O. Kesto 77, PEKING, ĈINIO sendis al ni jenan leteron:

„Estimataj gesamideanoj, ni ĝojas vin informi, ke nia movado revigliĝos baldaŭ en nia lando kaj nia laboro bezonas multajn materialojn esperantajn kaj priesperantajn. Tial ni petas vin sendi al ni ĉiujn esperantaĵojn de vi eldonitajn (ĉikune ni devas vin danki pro viaj sendaĵoj en lastaj jaroj) kaj informi al ni pri la gravaj esperantaj nadoj en via lando. Kompreneble nun ni ankoraŭ ne povas vin kompensi per niaj eldonaĵoj nek sendi al vi monon, kion ni povos fari nur estonte. Antaŭe dankas por via valora helpo kaj sincere vin salutas s-ane via Hujuz, Ĉina Esperanto-Ligo.

\- - -

En proksimaj semajnoj delegacio de TKKE (s-anoj Kožený, Dro Jermář kaj Vítek) informos la ministroj Dro Fr. Kahuda kaj Kopecký pri nuna stato de la movado alilande kaj enlande.

\- - -

Alilandajn esperantistojn – vizitantojn de la ĉeĥoslovaka ĉefurbo Praha – ni petas uzi, en kazo de bezono, iun el la telefonnumeroj sub „ESPERANTO".

**Praha-ek-1956-42_43-14**



NI SERVAS:

| | |
|---|---|
| LA NICA LITERATURA REVUO Jarabono | Kčs 10,-- |
| NORDA PRISMO | Kčs 22,-- |

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

| | |
|---|---|
| nova ILI PEREIS POR LA LIBERO (Bigor) | Kčs 3,-- |
| nova LA ALMOZULINO DE LA „PONT DES ARTS“ | Kčs 4,-- |
| nova SINJORO TADEO (Adam Mickiewicz) | Kčs 16,-- |
| nova LA FANTASKOPO (Minkov) | Kč s 1,50 |
| nova SEPTEMBRO (Milev) | Kčs 2,-- |
| nova KANTOJ POR LA PACO (Murgin) | Kčs 2,-- |
| nova URBO SUB SIGNO DE FAJRO (Majerová) | Kčs 6,-- |
| nova ELEKTITAJ RAKONTOJ (Elin Pelin) | Kčs 3,70 |
| nova FAMILIO GERAK | Kčs 2,-- |
| nova NOVAJ BULGARAJ RAKONTOJ (Vazov) | Kčs 2,50 |
| nova VAGABONDOJ | Kčs 6,-- |
| nova BULGARA ANTALOGIO | Kčs 19,-- |
| nova LA INFANOJ DE MILITBAZOJ | Kčs 5,-- |
| nova LA PLEJ FORTA VOĈO DE LA PACO (ĉina) | Kčs 2,-- |
| nova POR NOVA AFERO NOVA MANIERO | Kčs 5,-- |
| nova LEGOLIBRO POR SUPERAJ KURSOJ (Sarafov) | Kčs 19,-- |
| TAMAKA MEMORANDUMO | Kčs 3,-- |
| nova DU MALSANOJ EN ESPERANTO de (Hong) | Kčs 8,-- |

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Busto de Dro L. L. Zamenhof el bakita argilo (de akademia
Skulptisto Josef Paša) Kčs 36,--

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Protože již přijímáme předplatné na rok 1957, uveďte, pro který rok časopis předplácíte!

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Poznámka „nova“ před názvy knih znamená, že jde o tisk nepoužitý.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Rádi Vám posloužíme! Nezasíláme však nic na dobírku, ani bez předchozího zaplacení. Po obdržení Vaší objednávky Vám zašleme složenku, na níž je vyznačeno, co jsme Vám připravili k odeslání a čekáme jen na zaplacení. NEŽÁDEJTE VYJÍMEK Z TOHOTO OPATŘENÍ! VELMI NÁM TÍM ZTĚŽUJETE NAŠI PRÁCI. Nezaplatíte-li do 3-4 týdnů, máme za to, že na žádané nereflektujete a zrušíme Vaši objednávku. Objednávky a veškerou korespondenci řiďte na adresu: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

KORESPONDANANONCOJ.

Multjara esperantisto deziras korespondi pri radio- kaj televid- tekniko. Mi tradukas teknikajn datojn kaj disponas pri multe da prospektoj. Skribu viajn dezirojn al s-ano Kurt Haase, Böhlitz-Ehrenberg ĉe Leipzig, Pettenkoferstr. 16, DDR.

-

Anoj de la klubo „BONA STELO“ 31, rue Pécherie ROMANS (Drome) Francujo deziras korespondi pri diversaj aferoj kun junaj samideanoj.

- -

10 geknaboj deziras korespondi per PI kaj interŝanĝi PM kun tuta mondo . Skribu al s-ano Mil. Pavelka, por E-rondeto, Jaselská 1324, HRANICE, Ĉeĥoslovakio.

\- - -

F-ino Yosino TAKETA, Fukuoka Syógyó Kótó Gakkó, Katasaku, FUKUOKA – si, 17 jara deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun samaĝuloj.

\- - - -

Sendu bildkartan saluton al Esperanto-grupo de 9-13 jaraj geknaboj kaj subtenu ilian entuziasmon por internacia lingvo. Adreso: Esperanto-grupo Verda Stelo (s-ano J. v. Bonne) GENOUILLAC (Creuse) Francujo.

\- - - - -

14-jara studento Sáša AMBROŽ, Trojická 1, Praha II. volonte interŝanĝos PI kun tutmondo. Peto pri afabla represo en alilandaj esperanto – gazetoj.

\- - - - - - - - - - - -

**Praha-ek-1956-42_43-15**



A t e n t u !
Ni invitas vin partopreni sabate 1. 12. 1956 la tradician

N I K O L A A N V E S P E R A M U Z O N ,

kiun aranĝos la Junularo de Esperantista Klubo ĉe OB 2 en Praha, en Závodní klub p. z. o. Strojexport kaj Technoexport, Praha 2, Václavské nám. 56 (kinejo Blaník, enirejo: la unua pordo maldekstre).

Komenco: 19.30 h
Fino: 00.30 h

Programo:

Sabate 19.30 h: Gaja kaj kultura programo, preparita de la Junularo EK Praha /eventuale de gasto/.
Disdono de donacetoj, kiujn vi alportos por viaj geamikoj.
Danco kun muziko de la emitenta ĝazbando de ZK PZO Strojexport kaj Technoexport.
Amika kunesto.

Dimanĉe 9.00 h: En la ejo de EK Praha, „Malá scéna“, Praha 2, Smečy 26:
Diskutado pri aktualaj problemoj de la movado ĝenerala kaj junulara, kun partopreno de Josef Vítek, prezidanto de TKKE.
12.00 h: komuna tagmanĝo.
14.00 h: ekskurso tra Praha.

Fervojrabato: Demandu ĉe la plej proksima Turista, n. p., pri eventuala rabatita veturo al Praha kaj reen dum tiu tempo /iu ekspozicio, ekskurso k. s./.

Tranoktado: Kiu deziras sekurigi al si tranoktadon /sole en komuna tranoktejo/, fortondu la aliĝilon kaj sendu ĝin baldaŭ al s-anino Eliška Drapáková, Šubrtova 6, Praha 12.

Venu ĉiu juna esperantisto ĝis la aĝo de 85 jaroj!!!

Je revido ĝojas la Junularo de EKP.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Mi partoprenos la Nikolaj vesperon de Junularo EKP 1.12.1956 kaj mi petas rezervi al mi por la 1-a de decembro 1956 liton en komuna tranoktejo.

Nomo:
Mia adreso:
En:
Dato:

Subskribo: